

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XIX.

Warszawa, Septembro-December

Nr. 8 (118).

En la jaro 1926

„Pola Esperantisto“ regule
aperados 15 de ciu monato.

Th. Cart

Esperanto językiem żyjącym.

Poniżej podajemy przemowę, wygłoszoną podczas otwarcia letniego Uniwersytetu w Genewie, przez p. Th. Cart'a, profesora Szkoły Nauk politycznych w Paryżu i prezesa Akademji Esperanckiej.

Pozwólcie mi, Panie i Panowie, wyrazić pewną myśl, którą sami łatwo zrozumiecie, jeśli Was zainteresuje.

Esperanto jest językiem *żyjącym*, *żyjącym*, gdyż jest mową małego ludu, który go kocha i nim się ustawicznie posługuje. *Żyjącym* był Esperanto od początku, ponieważ w nim nietylko tłumaczymy jakieś wyrazy z innych języków, ale głównie dlatego, że w nim przejawia się myśl, która tkwiła w umyśle twórcy, Dr. Zamenhofa. Esperanto — to nietylko zbiór reguł gramatycznych, mniej lub więcej szczęśliwych, to wyraz wielkiej idei. Język *nasz* jest synem idei, która, gdy się narodził, dała mu duszę, tchnęła weń życie.

A jeśli nam zarzucają to, co zwie się mietycyzmem, nie bójmy się — znaczenie życia jest mistyczne.

Jeśli więc Esperanto żyje, musi się rozwijać podobnie, jak rozwijają się języki żywe. Tę ewolucję lingwiści tylko

konstatują, lecz nie biorą w niej czynnego udziału. Język rozwija się dzięki powszechnemu użyciu oraz dzięki wynalezieniu sztuki drukarskiej — zaciąga on tylko dług wobec pisarzy i myślicieli, którzy przez swe dzieła wzbogacają go, czynią bardziej giętkim, pogłębiają znaczenie jego wyrazów,

Zaden język, nawet najstarożytniejszy i najbogatszy nie wyczerpuje myśli. Rozwój języka — to ustawiczny wysiłek myślicieli — w najszerszem znaczeniu tego słowa — wysiłek czyniony poto, aby dać ciało swym myślom, aby je wyrazić słowem, tym najważniejszym czynnikiem ewolucji języka. Myśl ożywia język, który służy do zadosyć uczynienia naszym przeróżnym potrzebom zarówno w dziedzinie materji jak i duchu. Esperanto, język bardzo młody, ma jeszcze dużo pracy przed sobą, ale dowiódł on już przez swą bogatą bibliotekę w dziedzinie literatury, filozofji, podobnie jak w życiu codziennem, że jest zdolny oddać myśl ludzką. Czyż *całą* myśl ludzką? Nie! Wszystkie języki robią jeszcze podobne wysiłki, ale niechybnie osiągniemy ideał z czasem, jeżeli tylko pisarze, uczeni, myśliciele, a także przemysłowcy, handlowcy zechcą poważnie przestudjować Esperanto, aż do *zupelnego opanowania* go. Wówczas będą mogli przy jego pomocy wypowiedzieć to wszystko, co dotąd umieli wyrazić tylko w swych językach ojczystych.

Dla pokonania panującego sceptycyzmu, dzisiaj rozpoczynamy te wykłady, jeszcze bardzo skromne, które jednak po pewnym czasie staną się niezbędnymi dla cywilizacji międzynarodowej i dla całej ludzkości!

tłom. J. Burkatówna

Kongresa parolado de Dr. Antoni Czubyński la 31 V 1925.

Grandaj ŝanĝoj okazis dum lastaj naŭ monatoj en la esperantista movado en Warszawa kaj en Polujo. En pli ampleksa ĉambro ni kongresas, kaj niaj vicoj pligrandiĝis. Ni vidas inter ni novajn propagandistajn fortojn, kun juneca entuziasmo en la koroj, kaj kun ardo en la okuloj, eble unuafoje en ilia viro rikoltantaj fruktojn de ilia semado.

Ni resumu la alkreskom en la esperantista movado en nia lando.

Ne tro gaja estis nia situacio en Warszawa kaj en Polujo komence de la pasintjara septembro. Mi provis ĝin difini tiamaniere: „Se esperantismo estus ia konspira ideo, oni ne

povus pli deziri, ol ke la strato tiel multe sciis pri ĝi, kiel ĝi nun scias“. Malgranda grupeto de ĉiam la samaj, bone sin reciproke konantaj vizaĝoj, vivantaj per songoj pri pli glora pasinta estinteco vizitadis de tempo al tempo vespere la societejon ĉe la strato Królewska, trafoliumis la ĵurnalojn, kapkliniĝis tra leginte en ili, ke en la vasta mondo Esp. tamen disvolviĝas, plenumis la kurantajn estrarajn aferojn kaj iris hejmen dormi. Ne tro multe oni povis fari, ĉar ĉiujn penadojn oni kontraŭbatalis per la pseŭdoargumento, ke es-
perantismo, kiel hebreaĵo ne valoras seriozan priokupon de u-ajn sin mem ŝatanta Polo.

La koro dolore kunprem ĝis vidante tiun-ĉi situacion, kiun ankaŭ malbonigadis la fakto, ke la homoj, malgraŭ ĉiu entuziasmo por la ideo esperanta, tamen eaciĝas per preskaŭ ĉiam la sama obstina repuŝado de niaj penadoj trabori la granitan muron de publika indiferenteco. Samideanoj mem-
orantaj la pli riĉan kaj viglan estintecon ripetadis memkonsolante: „ni zorgu, ke esperanta cindro ne malaperu. Venos la tempo, kiam ĉio ŝanĝiĝos“.

Kaj la espero ne postulis longan atendadon: En decem-
bro 1924, ne longe post la morto de la Majstredzino la stu-
denta junularo, ĝis nun aparte kunvenanta, eniris amase niajn
vicojn. El la cindroj de velkiĝanta ardo ili eltiris la gluantajn
karbojn, ekflamis ili per la sento al la novaj penadoj jam
pli viglaj, kuraĝaj kaj fruktoportaj. Kvazaŭ je mistera alĵuro
ekdevenis novaj adeptoj de nia ideo, kiel la semoj ĝerman-
taj printenpe verdiĝante la kamparon, kiujn ne longe ankoraŭ
kovradis vintraj ŝimoj kaj sekiĝintaj trunketoj. Tie-ĉi nune
verdiĝas la kamparo de novaj markotoj.

De tiu-ĉi tempo datumas novaj kunsidoj, ĝis nun de
longe ne vidataj en la esp. societo, eble ankoraŭ en la antaŭ-
milita periodo. Multnombriĝis la ĉiusemajnaj kunsidoj, la ideo
enpenetris la pli kaj pli vastajn kampojn, la grandega kvanto
da homoj eksciis denove pri nia ideo, la stratoj denove afi-
ŝe proklamis en diversaj urboj de Polujo, ke Esperanto vivas,
kreskas, ia nova ardo montriĝis en la okuloj de novaj kaj
malnovaj propagandistoj. Kvazaŭ nova sango estis enŝprucinta
en la vejnojn de ŝtoniĝanta societo.

Ni ĉiuj komprenas, ke la celo de nia propagando devas
esti ne tiel la esperantaj societoj, kiel la esperanta ideo, ne
la kolektado de ĉiuj konantaj Esperanton en unu ĉambro,
kiel oni enarkivigas la librojn en la biblioteka ŝranko, sed la
eliro el la societo en larĝan mondon false, aŭ ne sufiĉe pri ni
informitan. Tial ne troŝatu la esperantajn societojn, kiuj devas
esti niaj elmarŝaj tendaroj, sed neniam kaj neniel la agad-

kampoj. Esperantismo ja devas esti la movado socia, ne societa. Tial ni ŝatu ĉiujn societajn kunvenojn, ĉar ili var-tas la esperantan infanon, sed kiam la infano jam maturiĝas en la plenenergian propagandiston, ĝi eliru el la infanejo kaj fondu la novan familion, kie-ajn li nur volas kaj povas. Tial ni zorgu pri la kursoj de Esp. en fakaj societoj, kaj ke ili liveru la novajn instruistojn.

Fine alvenos la feliĉa momento, kiam oni povos propa-gandi en diversaj fakoj kaj branĉoj. Ĝis nun anoncis la pre-tecon esti instruataj pri Esp. la policianoj kaj radiistoj, oni devas esti preparita, ke post ia tempo anonciĝos la komer-cistoj, kuracistoj, fervojistoj, ĵurnalistoj k. t. p. Nia patrina societo ne ampleksos ĉion kaj ĉiujn, ĝi simple estos disŝirita per la novaj organizaĵoj. Sed ni nur povas ĝoji de tiu-speca morto de la ĝisnuna societo, kiu estas nur trapasa, momenta fenomeno. Se iu povas ŝanĝi sian ĝisnunan ĉambreton je kelkĉambra komforta loĝejo, ĉu li ploros pro la perdo de la ĝisnuna ĉambreto?

Oni ekpostulos de ni novajn instruistojn, kiuj povas manki momente al ni. Ni devas ilin eduki. Sed ne ĉiam la propagando de nia afero estos nur idealismo, kaj la mo-mento, kiam oni postulos por la instruado salajron estos grava kaj epoka, ĉar ĝi signifos, ke oni povas akiri dank'al Esperanto la vivsubtenon. Tio allogos multe da hamoj, por kiuj Esperanto estis ĝis nun indiferentaĵo kaj devigos ilin lerni.

Ni tamen zorgu, ke ĉiu kurso estu gvidata aŭ en la societo, aŭ per la personoj diplomitaj, aŭ rajtigitaj por tiu-ĉi celo de la societo, ĉar tiamaniere ni evitos diversajn, ne sufiĉe kompetentajn personojn. Poste ni zorgu, ke ĉiu faka grupo kreu siajn proprajn instruistojn, ĉar estas kompreneble ke la kuracistoj bezonas alian terminaron ol la radistoj, aŭ komercistoj.

Se nur unufoje disvastiĝos la famo inter la neesperanta publiko, ke oni povas gajni per Esp. monon, oni nin tute alie komencos rigardi kaj ŝati. La mono dovigas al estimol

Dua afero tre grava estas nepre informadi la gazetaron pri de la progresoj en nia movado sen tro longaj teoriaj rezonadaj pri helpa lingvo, por kies solvado la publiko nekstas prepa-rita kaj sekve malkompetenta. Ni devas alkiutimigi ilin simple interkonsentigi kun la esperantaj faktoj rilate kiujn silentiĝas la filozofumado. *Contra factum non valet argumentum!*

Se iu azene filozofumas oni rompos al li tiun-ĉi malsa-ĝan ludon per simpla konsilo: „Vi ne konas la staton de la afero, sekve bonvolu antaŭe informiĝi pri tiu-ĉi demando

el la filologia kaj socia vidpunkto, aŭ alimaniere via opinio tiurilate estos senvalora". Kaj por tiuj-ĉi novaj adeptoj devas ekzisti informa, duparta libro, pri kiu zorgu niaj plejsupraj organizaĵoj: unu parto teoria ne ŝanĝiĝanta eĉ dum dekoj dajaroj kaj la dua ŝanĝiĝanta ĉiujare, enhavanta la statistikon kaj la kronikon de nia movado kaj de ĝia alkresko. Ĉi nepre devas esti dulingva: en lingvo franca, t. e. en la lingvo de diplomatoj kaj lingvo provizore „internacia“ kaj dua en Esp., kiu samtempe povus esti iagrade ankaŭ lernolibroj por la komencantoj. Al tiu-ĉi kompendio ni resendados por la kompetentaj informoj ĉiujn filozofumistojn kaj saĝetulojn.

Nenio pli bone disrompos la indiferentecon de neesperanta publiko, ol la faktoj pri alkresko de nia movado legataj de tempo al tempo en la ĵurnaloj. Se la aŭdado de koncertoj per radio ne estus ankoraŭ la fakto, oni povus teorie pri tiu-ĉi ebleco diskuti senfine, precipe se oni invitus por tiu-ĉi diskusio homojn malkompe tentajn, al kiuj oni per tiu-ĉi agado faros grandan komplimenton sed por si mem oni donos la ateston pri stulteco. Sed por la informado de la gazetaro ni ne nur bezonas la ellaboradon de la ĉiusemajna, aŭ ĉiumonata kroniko, sekve la organizaĵon, sed ankaŭ la personojn, kiuj scipovus atingi la redakciojn kaj klarigi al ili, ke ili malbone informas la publikon pri esperantismo. La antaŭjuĝojn de la gazetaro ni povas rompi aŭ senpere per la influo je personoj de la redakcio, se iu havas inter ili konatulojn, aŭ per speciala alvoko subskribita per kelkaj organizaĵoj tute senĝene malaperigante la falson kaj nebonan taktikon de la gazetaro kaj petante ĝin. Ŝanĝi Sed tiu-ĉi paŝon oni ne povas antaŭe fari kun favora efiko, ol kiam ni havos bone kaj sisteme laborantan oficejon pri informado, antaŭ ol ni ne trovos la nepre necesan kapitalon por la kopiado de la informoj kaj dissendado de ili al la gazetoj. Tiu-ĉi alvoko devas postsekvi niajn infornojn, sed ne antaŭsekvi ilin, ĉar alimaniere oni povus al ni respondi, ke oni nenion presas, ĉar oni nenion ricevas por la presado. Se la gazetaro pola havus ian kunvenon, nia redaktoro devus zorgi eniri tien, kiel nia reprezentanto, kaj ricevi la legitimacion ĵurnalistan kaj prezenti la rezoluciojn pri subteno de Esp. Plua propagando devas akceli niajn lernejojn. Apartajn kursojn oni povus aranĝi por la volontuloj en kelkaj viraj kaj fraŭlinaj gimnazioj, sed antaŭsekvi ilin devus la permeso de kuratorio. Pri ĝi ni devas zorgi. Kiam ni ĝin havos, la propagando esperanta fariĝos afero tiel ampleksa, ke ĝi postulos speciale salajratajn instruistojn. Sed ne pli frue ol kiam ni staros sur fortaj piedoj.

Sekve resumante la tutan situacion ni vidas, ke unu jaro ankoraŭ ne forpasis de la momento, kiam ni havis nian lastan kongreson, kaj la situacio tiel ŝanĝiĝis, kaj liveras tiel anpleksajn perspektivojn kaj esperojn, ke ni plenenturiasme povas ĝin rigardi.

Ni tramarŝis la fajron de pruvoj, for la malgrandanimeco, timema kvieto, mallaiŭto, malnecesa modesteco. Ni estu fieraj pri la ideo, kies predikantoj ni estas. Ni persistu ĝis la fino, kaj viglu, ĉar ni scias nek tagon nek horon, kiam ekbatos por ni la favora horo, Mi profetas al vi, ke alproksimiĝas la tempo, kiam oni diros al Vi (Luk XII 3) „kion vi dirus en mallumo, tio estos aŭdita en lumo kaj kion vi porolis en orelon en internaj ĉambroj, tio estos proklamita sur domoj“. Ni elstreĉu la fortojn, etendu la manojn por la pli gravaj taskoj. Atendas nin ankoraŭ granda laboro, dum kiu montriĝos niaj karakteroj, malnudiĝos niaj spiritoj en ĝiaj plejvaloraj elementoj. Ni estu kapablaj nin suprenlevi super la ofte malprofundaj babilemecoj kaj banalaĵoj de kelkaj esp. kunsidoj

Ni danku la sorton, ke ĝi nin lokigis sur tiu-ĉi noda punkto de la intelekta marŝado historia de la homaro, ke ni povis esti ne nur atestantoj en la periodo de tiuj-ĉi noblaj celadoj, sed ankaŭ partopreni en ili. Neniu ideoj realigas per si mem, sed ili bezonas laboron, la sudo humidigas la korpon de ĝiaj pioniroj.

Stefan Żeromski — Władysław St. Reymont

1864—1925

1854—1925

Ekĝemis tuta tero pollanda! Ĝi veplendas pro perdo de du el siaj plej famaj, plej amataj filoj nuntempaj.

Ŝajnas, ke milito ne finiĝis, ĉar jen ankoraŭ du el ĝiaj viktimoj falis. Same kiel la Majstro, same kiel la majstro de la esperanta poezio, A. Grabowski, kormalsano rezultinta el la militsuferoj, spertoj, esperoj kaj malesperoj, elĉerpis la sentemajn, vere homajn korojn, kaj fine forrabis de ni tiujn du gigantojn de la plumo. Ĉiu siamaniere vibrigis la kordojn de la homaj sentoj. Pro diversaj kaŭzoj, ili egalaj estas en la koroj de tiuj, kiuj ilin legis kaj komprenis.

Cor cordium — koro de la koroj de la nunaj generacioj. Stefan Żeromski estingiĝis subite la 20-an de novembro, kiam ĉiuj ĝojis ĉirkaŭ li, pro la fina venko ŝajna de la malsano. Sed lia spirito postvivas lin vere potence.

Pri Stefan Żeromski aperis artikolo en la Nr. 101-102 de „Pola Esp.“. Ni povas aldoni, ke de tiu tempo, estas tradukita en Esperanto unu el liaj plej altstilaj verkoj. Sed ĝi ne estas ĝis nun presita.

Kvazaŭ la sorto volus en la morto kunigi du plej diferencajn talentojn, 14 tagojn poste, subite ankaŭ, sentinte sin pli sana dum du tagojn lastaj, ekdormis por eterne Władysław St. Reymont. oni skribis pri li en la gazetaro tutmonda pro la Nobela premio aljuĝinta al lia verko titolita: „La kamparanoj“. Por la esperantistaro, P. E. aperigos lian biografion en venonta Nr. 119.

Ambaŭ verkistoj havis nacian enterigon, dum kiuj centmiloj da homoj el plej diversaj statoj kaj opinioj honorigis ilin.

Anstataŭ ripozi en la nacia panteono sub la Katedralo, ambaŭ ripozas simple kaj simbole en la tero, pro kies libereco ili batalis.

Eterne benata estu ilia nomo!

E. F. C.

Nia VII Kongreso.

(Malgranda babilado aŭstataŭ oficiala komuniko).

La lastan junion, kiam mi, dum la malfermo de la VI Kongreso en Warszawa, laŭ invito de Kongresa Komitato salutis la Kongreson, kiel membro de la Pola Esperanto Asocio en Wilno — mi diris, ke nia urbo estas ĉirkauita per arbaroj kaj arbaretoj, kiuj luligas vilnanojn, per siaj pinkantoj kaj tial nia Esperanta movado estas iom tro dormanta. Mi aldonis, ke mi estos tre ĝoja, se la laboro de VI Kongreso donos antaŭpuŝon al nia afero en nia urbo. Feliĉe mia antaŭsento efektiviĝis! La Kongreso konsentis uzi mian proponon pri la aranĝo de la VII en Wilno.

Kiam mi revenis hejmen kaj anoncis tion al nian vilnaj samideanoj, ĉiuj estis frapitaj: „Kongreso en Wilno! Sen mono sen helpo, sen praktiko!“ Mi penis prui ke Pola Samideano helpos al ni, la monon oni donacos kaj la praktikon ni ricevos, sed oni postulis, ke mi vojaĝu Varsovion kaj priparolu la aferon.

Kiam mi finpakis mian valizon, jam estis Aŭgusto kaj veninte al Warszawa mi eksciis, ke miaj kongresaj geamikoj s-ino Cense kaj S-ro Kostecki, kiujn mi volis interwew'i pri kongresaj aferoj, — jam estas en Francujo. Kion do fari? Kiel obeema membro de mia P. E. A. mi... vojaĝis Francujon. Bedaŭrinde mi ne trovis s-inon Cense, sed en Parizo

mi kaptis nian simpatian S-ron Kostecki kun kiu, ĉe la kafejo de Boulevard St. Germain ni komencis organizi la VII P. E. A. — Kongreson en Wilno en 1926 jaro.

S-ro Kostecki skizis al' mi interesan planon sub titolo: „kiel oni povas aranĝi Kongreson sen groŝo en poŝo“ kaj kiam ni finis, mi estis tiel certa, ke la VII estos organizita en Wilno, tiel firme mi akcentis la lastan „Jes.,“ ke kelnero postulis de ni duoblan prezon, kiel de Amerikanoj.

Kiam mi rakontis al niaj vilnaj esperantistoj la detalojn de la kongresaranĝo, ni decidis, ke ni estas maturaj por tiu enterpreno kaj ke ni uzos nian tutan volon kaj ĉiujn eblecojn por vidi Vin, karaj gelegantoj, en nia ĉarma Wilno estontan junion.

Ni penos iom pli malmulte dormi kaj ne aŭdi la malicajn lulkantojn de niaj belaj arbaroj kaj lobi por sukceso de la VII kaj ni esperas, ke Vi, karaj gesamideanoj, subtenos nin tuj membrigante kaj monhelpante, por ke ambaŭflanke ni povu esti kontentaj kaj diri:

— Ni, vilnanoj, faris nian devon-kaj Vi, esperantistaro de Polujo la Vian!

Roman Saĵowicz

(Ĝenerala sekretario de VII Kongreso de P. E. A. en Wilno)

Ruch esperancki w Polsce.

Pola esperantista movado.

W końcu listopada wyjechał do Paryża wice-prezes Polskiego Towarzystwa Esperantystów p. Jan Kostecki.

Cała polska Esperancja straciła w nim zapalonego współideowca, kompetentnego kierownika, świadomego naszych wielkich idei esperantystę i drogiego przyjaciela.

Po wojnie polscy esperantysty osieroceni przez takich wybitnych ludzi, jak Antoni Grabowski, znaleźli ich godnych zastępców. W pierwszym szeregu stał p. Jan Kostecki.

Prawie dziesięć lat pracując

En fino de Novembro forveturis Parizon vic-prezidanto de Pola Esperanto - Asocio s-ro Jan Kostecki.

La tuta pola Esperantujo perdas en li fervoran samideanon, kompetentan gvidanton, konscian je niaj grandaj ideoj esperantiston kaj karan amikon.

Post la milito la pola esperantistaro orfigita de tiaj eminentuloj, kiel Antoni Grabowski, trovis indajn je ili anstataŭantojn. En la unua vico staris s-ro Jan Kostecki.

Preskaŭ dek jarojn laborin-

w zarządzie Polskiego Towarzystwa Esperantystów, pozostawił po sobie niezatarte ślady. Zawsze skromny usuwający w mrok swe zasługi, wysokim taktem pozyskał sympatię wszystkich współideowców, swym entuzjazmem zawsze umiał zapalić adeptów esperanckiej sprawy do pracy w imię wspólnego ideału.

Po wielkiej wojnie był pierwszym między inicjatorami wskrzeszenia „Esperantysty Polskiego“, a potem stale w nim pracował. Jego pełne rozumu artykuły i uwagi przejdą do historii Esperanta jako perły naszej literatury. Prócz tego były wice-prezes był zawsze wierny naszym językowym autorytetom i stale z otwartą przyłbicą walczył o jedność języka.

Kogo straciliśmy, niechaj dowiedzie zainteresowanie i szczerzy żal wszystkich współideowców w Warszawie zarówno, jak i na prowincji z powodu jego wyjazdu.

Paryscy przyjaciele mogą być szczęśliwi, że pozyskali takiego esperantystę.

Jednak rozdzieliliśmy się tylko przestrzennie — duchowo pozostaniemy razem, ponieważ dla tej samej a drogiej pracujemy sprawy!

Prace p. Kosteckiego pozostaną zawsze w umysłach i pamięci polskich współideowców, z którymi czerpać będą dla siebie przykład.

Redakcja
„Esperantysty Polskiego“.

te en estraro de Pola Esperanto Asocio, li lasis neforgeseblajn post signojn. Ĉiam modesta, kaŝanta siajn meritojn, per la alta bontakto li gajnis simpatian de la tuta samideanaro, per entuziasmo li ĉiam sciopovis forvorigi adeptojn de Esperanta afero al laboro je nomo de l'komuna idealo.

Post la granda milito li estis unua inter la iniciatintoj de rekreo de l' „Pola Esperantisto“ kaj poste konstante por ĝi laboris. Liaj saĝoplenaj artikoloj, kaj rimarkoj transiros al Esperanta historio kiel perloj de nia literaturo. Krome la vicprezidinto estis ĉiam fidela al niaj lingvaj aŭtoritatoj kaj konstante malkaŝe batalis por unueco de la lingvo.

Kiun ni perdiĝ, pruvu la interesiĝo kaj sincera bedaŭro de ĉiuj samideanoj en Warszawa same, kiel en la provinco pro lia forveturo.

Parizaj amikoj povas esti feliĉaj, ke ili gajnis tian esperantiston.

Tamen ni apartiĝis nur teritorie — anime ni restos kune, ĉar mi por la sama kaj kara laboras afero!

Laboroj de s-o Kostecki restos por ĉiam en mensoj kaj memoro de la polaj samideanoj, el kiuj ili ĉerpos por si ekzemplon.

La Redakcio
de „Pola Esperantisto“.

Warszawa.

Jak zwykle w letnich miesiącach ruch zamiera, lecz skończyły się już dni wywczasów.

Dn. 14-X odbyło się pierwsze zebranie pokongresowe, podczas którego wice-prezes P. T. E. p. Jan Kostecki w barwnych słowach scharakteryzował działalność kongresu genewskiego. Potem nastąpiły uzupełniające wybory do zarządu P. T. E. Wybrano następujące osoby: p. Janinę Burkathównę, p. Jana Ferencowicza, p. Franciszka Kurczyka i p. Mieczysława Trochimowskiego.

21-X urządzono towarzyską herbatkę, szkoda tylko, że bez programu artystycznego.

31-X w salonach p. pułk. Günthera odbył się pożegnalny wieczór z powodu wyjazdu p. Jana Kosteckiego do Paryża. Szereg mówców z prof. Jerzym Lothem i Dr. Antonim Czubyńskim na czele podkreślało wybitną działalność p. Kosteckiego na polu rozwoju Esperanta w Polsce.

18-XI odbyło się pierwsze posiedzenie Zarządu Centralnego P. T. E. przy udziale dwóch przedstawicieli z prowincji. Posiedzenie to jest nader ważnym, bowiem reguluje stosunki oddziałów z Centralą (patrz komunikat).

Od początku listopada rozpoczęto silną propagandę. Trzykrotnie wielkie afisze propagacyjne pojawiały się na murach Warszawy. Prócz tego rozlepiono lub rozdano na ulicach 10

Warszawa.

Kiel ordinare dum someraj monataj la movado duonmortas, sed finiĝis jam tagoj de l' libertempo.

La 14-X okazis la unua postkongresa kunveno, dum kiu la vicprezidanto de P. E. A. s-ro Jan Kostecki per pitoreskaj vortoj karakterizis agadon de la kongreso en Genève. l'oste sekvis alpleniga elekto al est-raro de P. E. A. Oni elektis jenajn personojn: f-inon Janina Burkhat, s-ron Jan Ferencowicz, s-ron Franciszek Kurczyk kaj s-ron Mieczysław Trochimowski.

La 21-X oni aragiis societanta-vesperon, sed bedaŭrinde sen artista programo.

La 31-X en salonoj de kolonelo Günther okazis adiaŭa vespero pro forveturo de s-ro Jan Kostecki Parizon. Vico de parclintoj, inter kiuj estis prof. Jerzy Loth kaj D-ro Czubyński akcentis la grandan agadon de s-ro Kostecki je la kampo de disvastigo de Esperanto en Polujo.

18-XI okazis la unua kunsido de Centra Estraro de P.E.A., kiun partoprenis du reprezentantoj el la provinco. Ĉi tiu kunsido estas tre grava, ĉar ĝi regulas rilatojn de la grupoj kun la centra konitato. (rigardu la komunikon).

Komence de novembro oni komencis varme propagandi. Trifoje grandaj afiŝoj propagandaj aperadis sur la muroj de Warszawa. Krome oni disgluis aŭ disdonis en la stratoj 10

tys. ulotek, kilka ogłoszeń w gazetach obwieściło o kursach. Wymieniać tutaj należy p. Bohdana Bojanowskiego, który niezmordowanie przyczyniał się do propagowania naszej sprawy.

Dn. 21-XI odbyła się uroczystość otwarcia dwóch kursów jęz. Esperanto. Zebranie zagał prof. Jerzy Loth, który po wstępie odczytał wśród licznie zgromadzonych słuchaczy i członków towarzystw „Saluto el Varsvio“. Antoniego Grabowskiego, rozwijając na tem tle całą swą ciekawą przemowę. Pozatem mówił o sukcesach ostatnich, co wywołało burzliwe oklaski.

Następnie zabrał głos p. Mieczysław Kaus, którzy w swej przemowie porównał rozwój idei esperanckiej z rozwojem innych idei oraz zanalizował stosunek esperantystów do ich wielkiej myśli.

Całą uroczystość zakończyła inauguracyjna lekcja p. Eugénie Cense. Na zakończenie swej lekcji prelegentka opowiedziała łatwą anegdotą w jęz. Esperanto. Nowi słuchacze snadź zrozumieli ją dobrze, gdyż częste wybuchy śmiechu nie pozwalały jej kontynuować swą opowieść.

Słuchaczy podzielono na dwa kursy, na których wykładane są dwa przedmioty: teoria jęz. Esperanto i historia ruchu wraz z konwersacją. Część pierwszą prowadzą p. p. Tadeusz Swirtun i Mieczysław Trochimowski, drugą p. Eugénie Cense.

milojn da flugfolioj. Kelkaj komunikoj en gazetoj anoncis pri kursoj. Oni devas mencii nomon de ŝ-o Bohdan Bojanowski, kiu senlace kunlaboris en propagando de nia afero.

La 21-XI okazis solena malfermo de du esperantaj kursoj. La kunvenon malfermis prof. Jerzy Loth, kiu post antaŭparolo tralegis inter grandnombre alvenintaj partoprenantoj kaj membroj de la societoj „Saluton el Varsovio“ de Antoni Grabowski, disvolvante je tiu fono la tutan, tre interesan paroladon. Poste la preleginto parolis pri la lastaj sukcesoj, kio kaŭzis bruegan aplaudon.

Sekve prenis la vorton s-ro Mieczysław Kaus, kiu en sia parolado komparis disvolvon de esperanta ideo kun disvolvado de aliaj ideoj kaj analizis rilaton de esperantistoj al ilia granda penso. La tutan kunvenon finis inaŭtracia leciono de s-ino Eugénie Cense. Ĝe fino de sia leciono la prelegintino rakontis facilan anekdoton en Esperanto. La novaj kursanoj komprenis ĝin bone, ĉar oftaj eksplodoj de rido ne permesis al ŝi daŭrigi ŝian rakonton.

La partoprenantojn oni dividis en du kursojn, en kiuj estas prelegataj du lecionoj: teorio de la lingvo kaj historio de Esperanto - movado kune kun konversacio. La unuan parton gvidis s-oj Tadeusz Swirtun kaj Mieczysław Trochimowski, la duan s-ino Eugénie Cense.

Kraków.

W miejscowcm „Towarzystwie Esperanto“ usilnie pracuje młody esperantysta p. M. Ziomek, któremu udało się stworzyć przy wymienionem towarzystwie sekcję młodzieży esperanckiej.

Prócz tego p. M. Ziomek wyjeżdżał do Niepołomic pod Krakowem, gdzie przemawiał na zebraniu do około 100 osób. Poczem założył tam esper. grupę z p. J. Nowakiem, jako prezesem. Następnie w Białej przy pomocy tamtejszego delegata U. E. A. D-ra Haasa przemawiał do młodzieży katolickiej. W Białej zdobył także gazetę „Przyszłość dla naszej sprawy.

Ppodobne wycieczki propagacyjne są nader pożądane, dlatego grupy prowincjonalne potrzebujące mówcy dla młodzieży proszone są o zwrócenie się do p. *M. Ziomek, Kraków, Towarzystwo Esperanto, Sławkowska 6.*

Lwów.

Z powodu braku miejsca nie mogliśmy podać wcześniej ciekawych wiadomości ze Lwowa.

W czerwcu r. b. odbył referat sekretarza miejscowego towarzystwa Dr. Schnitzera n. t. „Moje wspomnienia z powszechnego kongresu w Krakowie“. Wśród słuchaczy, którzy nie uczestniczyli w kongresie, referat wywołał wielkie zainteresowanie.

Dalej znany lekarz Dr. Fels

Kraków.

En loka „Societo Esperanto“ penege laboras juna esperantisto s-ro M. Ziomek, kiu sukcesis krei ĉe la nomita societo sekcion de esperanta junularo.

Krome s-ro M. Ziomek veturis al Niepołomice apud Kraków, kie li paroladis dum kunveno, kiun partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj. Poste li kreis tie esp. grupon kun s-o J. Nowak, kiel prezidanto. Sekve en Białą, helpita de tiea del. de U. E. A. D-ro Haas, li paroladis al katolika junularo. En Białą li ankaŭ gajnis gazeton „Przyszłość“ por nia afero.

La similaj propagandaj ekskursoj estas dezirindaj, tial grupoj provincoj bezonantaj junularan paroladiston estas petataj sin turni al s-ro *M. Ziomek, Kraków, Societo Esperanto, Sławkowska 6.*

Lwów.

Pro manko de loko ni ne povis pli frue presigi la interesajn sciigojn el Lwów.

En Junio de k. j. okazis prelego de sekretario de la loka societo D-ro Schnitzer s. t. „Miaj rememoroj pri universala kongreso en Kraków“. La aŭskultintojn, kiuj ne partoprenis la kongreson, la prelego tre interesigis.

Sekve konata kuracisto D-ro

miał referat n. t. „O długo-wieczności“. Licznie zgromadzeni dśłuchacze dziękowali prelegentowi głośnemi oklaskami.

Pani Ewa Tenzerowa miała referat n. t. „Co słyślałam widziałam podczas VI kongresu Polskich Towarzystw Esperanckich“.

Fe's paroladis s. t. „Pri longviveco“. Multnombraj aŭskultintoj dankis la preleginton per bruegaj aplaŭdoj.

S-ino Ewa Tenzer prelegis s. t. „Kion mi vidis kaj aŭdis dum la VI kongreso de Polaj Esperantistaj Societoj“.

Miesiąc Esperancki.

Esperato w telegrafji. W tym roku odbyła się Konferencja Powszechnej Unji Telegraficznej, do której, jako członkowie, należą wszystkie państwa.

Na Konferencji tej postanowiono uzupełnić art. 7 Międzynarodowego Regulaminu Telegraficznego słowami: „Użycie Esperanta i Łaciny w telegrafji jest dopuszczalne“.

3-cie wydanie esperanckiego przekładu Faraona Prusa. Z powodu ukazującego się w druku 3-go wydania esperanckiego przekładu Faraona Prusa czytamy następujących kilka słów krytyki w esperanckim organie związku poczt. telegraf. telefon Interligilo de l' P. T. T. wychodzącym w Paryżu: „Jest to dzieło historyczne, które wskrzesiło cały starożytny Egipt. Autor oparł się na zdobyczach egiptologii, lecz nie wprowadził do swego utworu chłodu nauki i świątyń zaginionych, jakoteż piramid dotychczas trwających, lecz przeciwnie z każdej stronicy dzieła wyczuwa się życie, gorąco słońca, radość i smutek ludu egipskiego“.

Pierwszy międzynarodowy kongres prasy fachowej a esperanto. W Paryżu miał miejsc od 1—4 października r. b. pierwszy międzynarodowy Kongres prasy handlowej, technicznej i agronomicznej, który zebrał 171 delegatów izb handlowych i przeszło 140 reprezentantów instytucji technicznych z rozmaitych krajów. Specjalna komisja zbadła kwestję języka esperanckiego i wydała następującą opinię:

„Przyjawszy pod uwagę wielkie trudności z powodu zwiększającej się ilości prac technicznych i naukowych, publikowanych w rozmaitych językach: przyjawszy pod uwagę, że ogólnie używany język międzynarodowy ułatwiłby wielce pra-

ĉeĉu redagovania oryĝinalnyĉ praco, ĉu teĉu publikovania ich stresĉeĉnĉ, ĉu teĉu oĝlaszania ankiet miĉdzynarodowyĉ. Przyjawszy pod uwagĉ, ĉe ĝezyk Esperanto, kĉoreĝo uĝyĉie nadaje siĉ do stosunkĉw handlowyĉ dzieki swej jasnoĉi, prostocie i bogactwu, dostosowaĉ siĉ rĉwnieĉ do potrzeb techniki i wiedzy, pierwszy miĉdzynarodowy Kongres prasy handlowej, technicznej i agronomicznej wyraża nastĉpujĉce ĝyczenia: 1) ĝeby Esperanto byĉ uĝywanym w prasie technicznej et. cet. przynajmniej dla publikowania stresĉeĉnĉ, kĉore winny nastĉpowaĉ po oryĝinalnyĉ pracach w dziennikach i przeglĉdach naukowyĉ caĉego ŝwiata; 2) ĝeby esperanto byĉ przyĝyĉy jako oficjalny ĝezyk na Kongresach prasy caĉego ŝwiata narĉwni z ĝezykami narodowymi. Kongres zaaprobowaĉ i przyĝyĉy powyĝsze rezolucje.

Bibliografio

Hejma prozo. Kolekto de tradukoj eldonitaj okaze de la Xlla Kataluna kongreso en Palma de Mallorca de J. Bremon Masgrau. 64 p. libreto, formato 12 × 17 cm. Enhavas kelkajn, bone elektitajn, rakontetojn de diversaj aŭtoroj: Apeles Mestres, J. de Asensi, Gustau Becquer kaj Heyermans.

La stilo de nia samideano Bremon estas ja sufiĉe konata, por ke ni ne parolu pri ĝi. Kiun miro ni do rimarkis dufojan uĝon de la participo adverbo rilatanta al la komplemento, ne al la subjekto. Paĝo 7 l. 16: *mi lasis la iaineton ludante kaj mi iris...*, p. 20, fino de la 4-a alineo: *balanciĝante anstataŭ: balanciĝanta*. Tuj post la unua erara uzo ni trovas tamen la korektan formon: *reveninte mi aŭdis...*, kaj ankaŭ de participo-adjektivo: *mi vidis ŝin elirantan*.

Troviĝas ankaŭ kelkaj gallicismoj aŭ romanismoj. P. 12 fino de 2-a alineo: „*Jela sama koloro del'vizaĝo...* Estus preferinde diri: *Samkoloraj estis la vizaĝo la brakoj k. t. p.* Paĝo 14-a l. 3a: *kaj ilia malbena ne longe daŭris sentigi sin.* (kaj baldaŭ ilia malbena sentigis sin). Paĝo 16, l. 4 de malsupre: *sin mem koncentriĝante*, anstataŭ: *koncentrigante*. Paĝo 19, l. 4-a: *la rosnokto* aŭ *la rosa nokto*, aŭ *la nokta roso*. — Paĝo 32. l. 9: *Mi ne diris, ke ne estis nenecese*. Certe enŝteligis ĉi tie iu *nenecesa ne*, ĉar la frazo ne estas kombrenebla — Paĝo 46, l. 18: *malmananta* anstataŭ: *nebezona* aŭ *troa*. — Fine, p. 62, l. 6, uzo de infinitivo kun sen: *senkontraŭdiri*. nenian konsilata. Prefere sen vorto de kontraŭdiro aŭ nenion kontraŭdirante kaj p. 63, l. 6: *escepte nian fi.ozofon, ĝiu plendis*. anstataŭ *kompatis* plie, la akuzativo estas troa.

Ĉiuj rimarkoj estas farataj precipe por la junaj legontoj, ĉar ili ne malhelpas, ke la libreto legiĝas facile kaj agrable. Jen ĝi prezentas poezioplenan rakonton, jen aminde filozofan kaj moralan, aŭ bonhumore kritikan. Pr. 1 peseto 10% por sendkostoj: Ĉe Ferran Montserrat, c. Villaroel, 107, 2o, 2a, Barcelona.

Psika analizo kaj edukado. Pierre Bovet, Prof. ĉe la universit. de Genève, Leciono farita dum la kongreso en Genevo, ĉe la Somera Universitato. En tiu kvazaŭ enkonduka studo, la profesoro montras kiamaniere oni povas kuraci psiĉe malsanajn personojn, post ekkono de ilia animstato, kaj kiel oni povas ekkoni tiun staton. La nova scienco estas speciale necesa por la geinstruistoj. La legado de tiu broŝuro malfermos al ili novajn horizontojn de ilia laborkampo. La klareco de la klarigoj, iafoje malfacilaj, estas indaj je fama pedagogo. Sekvas listo de legindaj verkoj diverslingvaj, kaj de diversaj aŭtoroj, pri la sama temo. Broŝuro 37 paĝa, formato 15 21 cm. Prezo ne montrita: Prof. P. Bovet, 4 rue Charles Bonnet, Geneve.

Gvidlibro de la III Iberia kongreso Esperantista. Cordoba, 1925. Broŝuro 40 paĝ., formato 14×21 cm. Ornamita per portreto de la Majstro, per grupo de la kongresa komitato kaj multaj fotoĉapeloj reprezentantaj la riĉan arĥitekturon, de Andaluzio; Almeria, Kadis, Jerez, Huelva, Jaen. Malaga, Granada, Sevilla, Kordoba, prezentas sian perlaron. La historia priskribo estas lerte farita. La ilustraĵoj tre allogaj parolas pri vormeco, suna lumo kaj ili brilas kvazaŭ juveloj.

Ne estas mirinde, ke inter tiu juvelaro kaj en la lumo ĝue flugas papilioj. Kvazaŭ papilioj ŝvebemoviĝantaj de floro al floro flugis la gazeto de okulo al okuloj de la Iberia leganto, portantaj al ĝi informojn pri la III Iberia kongreso. La Esperantistoj ne bezonis tiajn alvokojn: ilin gvidis la stelo hele brilanta en la Duoninsulo Iberia. Unue, ili vizitis la kadron de la kongreso, malnova inde ornamita kadro por tia kunvena laboro.

La rezulto de la laboroj estis decido pri definitiva fondo de Hispana Esperantista Asocio, anstataŭ konfederacio Iberia. Oni fiksas la lokon de estonta kongreso en Madrid. Sukceson al via laboro karaj Iberiaj gesamideanoj!

Noveloj de Henryk Sienkiewicz. Tradukis Lidja Zamenhof. Libreto 64 p. formato 12×18 cm. Enkonduka vorto de la tradukinto pri la fama pola aŭtoro, kies kvin noveletojn ŝi prezentas al la legentaro, okupas la 7 unuajn paĝojn. La esperantistaro certe interesiĝos pri tiu nova eldono el la pola lite-

raturu. Oni nur povus esprimi la bedaŭron, ke la tradukintino ofte donis tro fidelan, tio estas laŭvortan tradukon, anstataŭ pripensi unue la sencon de la frazo. Sed pro la miraklo ĉiama de Esperanto, ĉiu komprenos facile legante, eĉ se oni opinias, ke oni iom alimaniere esprimus la ideojn, tie esprimitaj. Eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. E. F. C.

P. T. E.

(P. E.-A.)

KOMUNIKAT № 1.

Zarządu Centralnego P. T. E.

Na posiedzeniu Z. C. P. T. E. w dniu 18 listopada r.b. przy udziale delegatów oddziałów z Kuluszek i z Radomia uchwalono:

a. Wszystkie Oddziały P. T. E. obowiązane są: 1) nadesłać listy członków z adresami i listy zarządów do dn. 1 stycznia r. 1926; 2) nadesłać szczegółowe sprawozdania za rok 1926 do dn. 10 stycznia 1926 r., a w roku przyszłym nadsyłać stale sprawozdania co kwartał na specjalnych formularzach, które zostaną Oddziałom rozesłane.

b. Wszystkim Oddziałom rozesłany zostanie regulamin ustalający stosunek oddziałów do centrali. Według tego regulaminu ustala się pismo „Esperantystę Polskiego” („Pola Esperantisto“) za organ urzędowy P. T. E. i wskutek tego Oddziały obowiązane są prenumerować to pismo przynajmniej po jednym egzemplarzu.

c. Stworzono Stałą Kasę Kongresową, do której wszystkie Oddziały winny wpłacić 10% swych wpływów z wyjątkiem składek członkowskich. Na skarbnika powołano p. Franciszka Kurczyka, członka Z. C.

Centralny Zarząd przypomina o obowiązku oddziałów wpłacania do kasy Z. C. po 10 gr. od członka miesięcznie; opłata ta należy się już od października r. b.

Z. C. usilnie prosi o wykonanie wszystkich uchwał, gdyż zmuszony byłby Oddziały opieszałe likwidować.

Datę przyszłego posiedzenia wyznaczono na 19 grudnia na g. 8 wieczór (Królewska 19). Delegaci oddziałów proszeni są o przybycie w miarę możliwości.

Zarząd Centralny

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk
Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Pawia 10.

„Roczniki Katolickie”

wydamy w styczniu 1925 r. po raz trzeci, tym razem za rok 1924. Zachęcają nas do tego życzliwe listy biskupów polskich oraz rozliczne przychylnie recenzje, z których przytoczymy choćby „Dnia Polskiego” (Warsz. z 13. IX. 24): „X. C. jako kronikarz posiada dwie cenne zalety, formalną i moralną, pisze stylem bardzo żywym i barwnym, choć pełnym prostoty i w ocenie zjawisk jest sprawiedliwym tj. przy całej swojej wlerze i gorliwości katolickiej nie jest fanatycznym”.

„Roczniki Katolickie” są u nas potrzebne ze względu na budzące się uświadomienie katolickie.

„Roczniki Katolickie” są wprost konieczne ze względu na pierwszorzędne stanowisko, jakie Polska zajmuje czy zająć powinna w pochodzie katolicyzmu.

„Roczniki Katolickie” są wprost niezbędne ze względu na budzący się i tężejący katolicki ruch społeczny.

„Roczniki Katolickie” są pewnym, bo opartym o literaturę opisanego narodu, informatorem o współczesnym ruchu katolickim nie tylko w kraju ale i zagranicą: dla księży, nauczycieli, posłów, redaktorów i wogóle wszystkich, mających serce wrażliwe i umysł otwarty na sprawy Kościoła.

„Roczniki Katolickie” są i przyjemnym towarzyszem, bo bezwzględność wielka w zebraniu szczegółów wraz z artystycznym ich ułożeniem, styl żywy, piękny, nieraz barwny sprawia, iż książkę czyta się z podobnem zajęciem, jakie towarzyszy lekturze francuskich tego rodzaju „Rapports” czy „Comptes-rendus” („Głos Narodu” 1923, Nr. 149).“ —

Cena rocznika będzie wynosić ok. 8 zł. Objętość około 500 stron. Ciągłe jeszcze można się zgłaszać na listę abonentów; im więcej ich będzie, tem tańsze będą „Roczniki” i tem pewniejsze ukazywanie się i w przyszłych latach. Abonenci płacą tylko $\frac{2}{3}$ klerycy i studenci $\frac{1}{2}$ ceny. Abonentów, którzy zmienili swoje miejsce pobytu, uprasza się o *podanie adresu*, by zapobiec kosztom i nieporozumieniom. Pieniądzy nie potrzeba wpłacać, ściąganie się e przy odesłaniu książki przez zaliczkę.

Adres redakcji i administracji „Roczników Katolickich”:

X. Nikodem Cieszyński — Poznań.

W. Szan. PP. Autorów i Nakładców uprasza się o łask. przesyłanie dzieł z zakresu zagadnień religijnych, uczyni się o nich wzmiankę w „Roczn. Kat.”

Pola Esperanto Asocio

Plej malnova kaj plej granda Esperantista Organizo en Polujo.

Agadrajto sur la tuta teritorio de la Respubliko. Grupoj kaj Membroj-Korespondantoj en preskaŭ ĉiu granda pola urbo.

La agado de la Asocio kaj la „Poznanja Deklaro“, deviga por ĉiuj membroj, pruvas, ke la Asocio zorgas ne nur pri la propagando de Esperanto, sed ankaŭ ne forgesas pri pola propagando eksterlande. Ĝi kunigas Polujon kun la granda Rondo Familia de Popoloj en la senco de reciproka ekkono kaj simpatio.

Ĉiu Esperantisto, ĉiu Esperanta Grupo, al kiu niaj idealoj, al kiu la potenco kaj unueco de nia landa morado estas karaj

ALIGU TUJ AL POLA ESPERANTO ASOCIO!

Jara kotizo kaj enskribo Zł. 7. — Por Membroj — Subtenantoj Zł. 19. —

Uzu la aligilon, kiu troviĝas sur lasta paĝo de tiu-ĉi numero!

La granda intereso por ĈES-adresaro instigis nin aperigi

tute senpage

la nomon kaj adreson de ĉiu samideano kiu vere intencas interkonatigi kun la tuta mondo.

Aligojn bonvolu sendi tuj al

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Servo

Praha II., Žitná 44.,

iu eldonos ĈES-adresaron komence de la nova jaro.

Skribu legeble!

Varbu interesatojn!

Redakotr okaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Pańska 60.